

3 LA ORIGINO DE LA FIKCIOJ KAJ DE LA SCIO

3.1 *El la historio esoterika*

¹Kiel ekestas sunsistemoj, kiel nia sunsistemo kaj planedo estis formitaj, kiel la vivo estas en nia planedo evoluanta, ni lasu ĉion tion flanken. Tiujn aferojn la interesiĝintoj povas studi en la esoterika literaturo ekzistanta. En la sekvanta skizo estos liveritaj kelkaj nemultaj faktoj pri la konscievoluado de la homaro dum la nuna eono. En tiu priskribo estos menciitaj nur tiaj faktoj, kiuj estas esencaj por kompreni la originon de la scio, kaj kiamaniere tiun scion, kiu estas la heredaĵo de la homaro, oni anstataŭigis per la fikcioj de la nescio. Da la historio de la homaro estos pritraktita nur tio, kio estas necesa por kompreni la nuntempan situacion rilate la scion. Tio estas pli grava ol ĉia ajn historio. La homaro palpe serĉas en la mallumo survoje al celo nekonata, kaj ĝia malorientiĝado priviva neniel povas esti pli granda. La intenco estas prezenti al serĉantoj la fadenon Ariadnan gvidantan el la labirinto de la vivnescio. Verŝajne interesiĝos pri ĝi nur tiuj, kiuj posedas la esoterikan scion latente en sia subkonscio depost antaŭaj enkarniĝoj. La ceteraj sin tenos, kiel certe ili ĉiam faris, je la aŭtoritatuloj hodiaŭaj kaj je la ĝenerala opinio en la scienco, la filozofio aŭ religio. Plej sekura sinteno, ni ja komprenis.

²Entute la homaro konsistas el ĉirkaŭ 60 mil milionoj da individuoj, troviĝantaj en la fizika, emocia, mensa kaj kaŭzala mondoj de nia planedo. Kaŭzaliĝis (transiris el la animala regno en la homan per akiro de propra kaŭzala kovrilo) el ili ĉirkaŭ 24 miliardoj en Lemurio komence de la jaro 21 686 420 antaŭ nia erao. La ceteraj 36 miliardoj estis transigitaj al nia planedo en diversaj vicoj. La kaŭzalaj kovriloj de tiuj 36 miliardoj estis de plej malsama aĝo. Jen la ekspliko de tio, ke la individuoj de la homaro sin trovas en evolustadioj vaste diferencaj, kaj ke multaj el ili jam sukcesis transiri al pli altaj regnoj.

³Plej ĝenerale povas esti dirite, ke la nuna fizika konscio de la homaro evoluis en Lemurio, la emocia en Atlantido kaj la mensa konscio en la kontinentoj de ni konataj. Restas tamen multo, antaŭ ol ni estos disvolvintaj la plenan fizikan, emocian kaj mensan konscion en niaj fizik-etera, emocia kaj mensa kovriloj. Kiam ni estos plenumintaj tion, kaj kiam ni estos akirintaj plenan objektivan konscion en la kaŭzala kovrilo, tiam ni transiros al la kvina naturregno.

⁴Kiam la organika vivo sukcesis, post ĉirkaŭ 300 milionoj da jaroj en la nuna kvara eono de la historio de la Tero, ĝis tiom evolui, ke la cerbo simi-homa povis komenci mensiĝi kaj per tio povis komenciĝi la intensiĝado de la konscievoluado, la sunsistema registaro opiniis, ke tempo jam venis por ke transprenu aparta planeda registaro la zorgadon pri nia planedo. Tio okazis, sekve, ĉirkaŭ antaŭ 21 milionoj da jaroj. La planeda registaro siavice transigis al nia planedo individuojn atingintajn la kvinan naturregon, por ke ili konsistigu tiun planedan hierarĥion, kiu gvardu precipe super la evoluado de la homa konscio. Anoj de tiu planeda hierarĥio enkarniĝadis en la homaro kaj poste konsistigadis tion, kion en la esoterika historio oni nomis la "supra pastraro". Tio okazis en Lemurio. Tuj post kiam la konscio evoluis ĝis tiom, ke la homoj ekkapablis lerni, ili ricevis la necesan instruon kaj scion pri tiu realo, kiun ili povis intelekti. Kaj en Lemurio kaj en Atlantido estis starigitaj templaj lernejoj, en kiuj la homara elito ricevadis la edukadon respondan al ilia eblo de intelektado. Tiu elito konsistis kompreneble el tiuj individuoj kvararegnaj, kiuj transiĝis al la planedo en diversaj vicoj kaj rilate konscion jam progresis antaŭe de la cetera homaro. La elito edukiĝis por esti instruistoj de la cetera homaro kaj iom post iom fariĝis la "malsupra" pastraro.

⁵En la komenco ĉio iradis laŭ kalkulo, antaŭe en Lemurio kaj poste en Atlantido. En ambaŭ tiuj duonsferaj kontinentoj ekfloris kaj civilizacioj kaj kulturoj en certaj rilatoj poste ne atingitaj en niaj kontinentoj. Vere ne strange, ĉar gvidadis ilin la plej supra elito, kiu jam transiris al pli altaj regnoj.

⁶Evidentiĝis tamen, ke la scio potencodona, la scio pri la naturfortoj, precipe pri mense direktataj eteraj energioj, kondukas al la misuzo de la scio fare de ĉiuj delogeblaj al ĝia privata uzado. Granda parto de la malsupra pastraro, kiu akiris scion pri magio, ribelis kontraŭ

la supra pastraro. Estante instruistaro de la amasoj, la malsupra pastraro sciis, kiel ili kuntrenu la amasojn, uzante la ĉiam prosperan ruzaĵon (absurdajn promesojn kaj esperigojn). La planeda hierarĥio estis dispelita unue en Lemurio, poste en Atlantido. Trompите, la popolo spertis la valoron de la promesoj. La ruzaj gvidantoj elpensis la koncepton pri la peko kaj kredigis al la amasoj la doktrinon pri la peko kiel krimo kontraŭ dio, kiu kolerigas kaj punvizitas la popolon pro ĝiaj malbonfaroj. Laŭ ilia diro nur la pastraro povas influi dion kaj plenumi la oferojn necesajn por la pekliberigo. La tenego ja la amasoj, kiun ili per tio havigis al si, komencis malfirmiĝi nur ĉe la franca revolucio.

⁷La rezulto por la popolo misgvidata estis tiranio, kiun nia tempo pli facile komprenus, se Hitler sukcesus efektiviĝi siajn planojn. La aferoj iradis ĝis tio, ke la planeda hierarĥio devis apelacii, kaj pri Lemurio kaj poste pri Atlantido, al la planeda registaro por interveno. Kaj la registaro komprenis, ke estas necese subigi la kontinentojn en la profundon de la maro. Tiu ondego, kiu ĉe la subigo de Atlantido lastafoje lavis la restantajn kontinentojn, en la skriboj de la hebreoj distordiĝis en la tiel nomitan diluvon.

⁸Malbonuzo de scio kondukas al perdo de la scio, kaj post kiam la planeda hierarĥio estis dispelita el Atlantido, estis donite al la homaro "zorgi pri siaj propraj aferoj". Do nia nuna homaro rikoltas tion, kion ĝi semis. "La historio tutmonda estas la kortumo tutmonda." Povis regadi la perforto, la arbitro, la vivnescio. Rezulte la konata parto de nia tutmonda historio estas la historio pri neesprimebla suferado. Nur la nombron de homoj bruligitaj pro la gloro de dio kaj Moleĥ la esoterika statistiko kalkulas ĝis 60 milionoj. Eble ne estas strange, ke la subkonscio de multaj homoj eligas instinktan senton de ŝarĝiteco de kulpo malnova.

⁹Tamen ne ĉiuj partoprenis la ribelon de la nigra pastraro kontraŭ la supra pastraro. Tiuj individuoj, kiuj atingis la stadion de kulturo kaj staris sur la flanko de la bono, ne senrajtigis al si rememori sian antaŭan scion. Por ilia servo la planeda hierarĥio fondis sekretajn sciordenojn en ĉiuj nacioj antingintaj tian evolustadion, ke kulturaj individuoj povis enkarniĝi en ili.

¹⁰Ordinare, do, nur ĉi tiuj individuoj ne povas akcepti iun el tiuj sennombraj idiologioj de la nescio, kiuj inundas la homaron, sed restis serĉantoj de la "perdita diro de la majstro" aŭ la "filozofa ŝtono".

¹¹En sia senlima kompatato al la homaro malorientiĝinta, suferanta, la planeda hierarĥio faris du penojn por vekti la komprenon pri la racieco de la vivo kaj por kontraŭagi al la teruriga malamo interhoma, kiu ne povas ne pliakrigi la suferadon en la mondo. En Hindio enkarniĝis Buddho en la nacio tiam plej intelektiĝinta por peni instrui al ĝi tion, kion oni nomis la "religio de la saĝo". Kaj en la hebrea popolo enkarniĝis Ĥristos por vekti la komprenon pri tio, kion oni karakterizis kiel la "religion de la amo".

¹²La elekto de la hebrea nacio dependis de tio, ke estis antaŭvidita ĝia neevitebla dispeliteco. Oni deziris fari provon por vekti la supran emocian konscion de tiu popolo, por ke ĝi povu agi misie en tiuj nacioj, en kiuj ĝi loĝiĝis. Centoj da malnovaj inicitoj enkarniĝis por prepari la taskon de Ĥristos kaj por liberigi la popolon de ĝia fizikisma opiniaro, ĝia fikcio pri "mesia regno" en la fizika mondo kaj tiel plu.

¹³Malsukcesis, kiel estas konate, ambaŭ provoj. La disĉiplojn de Buddho oni forpelis el Hindio, kaj pri la Ĥristosa mesago pri la amo ekzorgis individuoj apartenintaj al la nigra pastraro de Atlantido.

¹⁴Al la planeda hierarĥio restis nenio alia ol daŭrigi la fondadon de novaj sciordenoj kaj, cetere, provi plivivigi la emocian kaj mensan konscion de la homoj por ke ili povu evolui ĝis pli granda kompreno de la realo.

¹⁵Dumtempe en Hindio la kasto de la bramanoj, la pastroj kaj la kleruloj, kiel ĉie (kaj ankoraŭ) metis sian pezan manon sur la popolon kaj sufokis la evoluadon. En Eŭropo kontraŭe "la lumoj komencis brili".

¹⁶La intelekta vivo dum la 18-jarcento penis liberiĝi de la teologia tiraneco kun ĝia malpermeso al pensado libera. En Anglio Hume (1711–1776) inter aliaj demonstris la fikciecon

de la teologiaj kaj filozofiaj pensosistemoj. En Francio ĉiam pli disvastiĝis la tiel nomita klerismo, kies tendenco implicis, ke la homo povas akiri scion nur pri la videbla mondo. En Germanio Kantio (1724–1804) sin okupis pri forĝado de novaj katenoj por la pensado kaj pri pruvado, ke ĉia parolo pri realo superfizika estas absurdaĵo. La naturo esplorado progresis rapide, kaj sekvis la unu malkovro post la alia. Laplace (1749–1827) en sia *Système du monde* ("La mondsistemo") konstruis universon, kiu ne bezonas la hipotezon pri iu dio kiel klariga bazo. Lamarck (1744–1829) montris en "La filozofio de la zoologio", ke bestoformoj pli altaj evoluis el pli malaltaj, kaj tial ne havas fundamenton la hebrea rakonto pri la kreado, laŭ kiu kreis dio ĉiun zoologian specion aparte. La batalo kontraŭ la hebrea mondrigardo estis ĉie en plena irado, kvankam daŭros longe en la 19-an jarcenton, antaŭ ol oni fine povos konsideri forigita la teologian tiranecon de la pensado, eĉ se la religiaj dogmoj ankoraŭ plu tenadis sian potencon super la ordinaraĵoj. La filozofie kaj science edukitaj homoj ordinare fariĝis "liberpensuloj", agnostikuloj kun skeptika sinteno al ĉio superfizika.

¹⁷La legoscio disvastiĝinta ĉiam pli dum la 19-a jarcento, la pliiĝanta kapablo de pri-pensado, la malsamopinieco de la sciencistaro kaj klerularo en la plejmulto da demandoj kaj pri mondrigardo kaj pri vivrigardo, kondukis al tio, ke ĉiam pli da homoj komencis spekulativaj memstare, akirante propran koncepton pri la vivo kaj ĝia senco. Kaj ĉar multaj opiniis, ke ĝuste iliaj fikcistemoj spekulativaj elpensitaj estas tiel valoraj, ke necese tiuj konatiĝu al la cetera homaro, iom post iom estis ricevataj sennombraj idiologioj, religiaj sektoj kaj filozofiaj rigardoj. (Idiologio, la konstruaĵo de la nescio priviva, el la helena vorto *idios* = propra, kontraste al ideologio kun ideoj Platonaj = ideoj de realo.)

¹⁸Ĉiu nova generacio denove ekzamenas la klarigojn de realo donitajn al ĝi kaj, nekontentigite de la hipotezoj aperintaj, serĉas novajn solvojn de la nesolvita problemoj. Ĉiam pli da homoj antingas la rezulton, ke ĝi ŝajnas nesolvebla, kiel siatempe Buddho klarigis, ke ĝi estas por homa racio.

¹⁹Multaj homoj, kiuj atingis pli altan evolustadion kaj senlace serĉas pluen, aŭ finas en la religia mistikismo aŭ fine trovas superfizikan rigardon respondantan al ilia intelekta bezono kaj ŝajnanta al ili sufiĉe racia, por ke ili povu akcepti ĝin kiel laboran hipotezon.

²⁰La jaro 1775 iĝis grava jaro en la historio de la homaro. De antaŭ longa tempo aktivadis la du specialaj perantoj de la planeda hierarĥio dum la 18-a jarcento. Saint Germain (45-mio; alinome Proklos, la "skolastikisto de la helena filozofio", kies verkoj dum jarmilo difinis la sciencan metodon ĉe la araboj kaj la kristanaj filozofoj mezepokaj; alinome Christian Rosencreutz; alinome Francis Bacon; en la tri enkarniĝoj plej laste menciitaj li estis la ordenestro de la Rozkrucaĵoj.) ĉie en Eŭropo penis vekigi intereson por starigi societojn sekretajn, en kiuj ili povu pensi "libere" en trankvilo for de la pensotiranado de la eklezio. Kaj elkreskis tiaj societoj kiel fungoj post pluvo, sed la plimulto da ili memmortis. Estas tute alia afero, ke multaj el ili poste falis en la manojn de ĉiaspecaj ĉarlatanoj. Cagliostro (kaŭzala mio, alinome Paracelsus) ricevis la taskon, ne "prepari por" la franca revolucio, sed fari preparojn por malhelpi al ĝia degenero.

²¹Finrikoltis la homaro sian malbonan semadon de Atlantido. En tiu rilato la scio pri la realo do povis fariĝi publika propraĵo. Restis nur la demando, kiamaniere oni ĝin komuniku al homaro implikita en siajn fikciajn sistemojn emocie ankritajn. Tiu demando rilatis ankaŭ al tiu nova semado, kiun la homaro devas rikolti pro siaj malbonfaroj faritaj dum la postatlantida epoko. Tiu semado postulos ankoraŭ ĉirkaŭ kvin cent jarojn por rikolti, dum kiu tempo finbatalos sian maldolĉan batalon la sennombraj idiologioj en politika, sociala, ekonomika, religia, filozofia kaj tiel plu rilatoj. Tiel longan tempon daŭros, ĝis ĉirkaŭ 60 procentoj da la homaro komprenos, ke la hilozoiko estas el ĉiuj laboraj hipotezoj la plej racia. La ceteraj 40 procentoj nek volas nek povas malhavi siajn emociajn iluziojn.

²²La problemon pri tio, kiel la homaro tute malorientiĝinta plej bone povos asimili la scion, oni jam longe pridiskutadis en la planeda hierarĥio, kaj vastaj preparoj estis faritaj. La ĝenerala opinio estis tamen tia, ke ankoraŭ daŭros longe, ĝis rekta agado estos ebla.

²³Estis dum la kunsido de la planeda hierarĥio en la jaro 1775, ke du el ĝiaj anoj, tiamaj 45-mioj M. kaj K.H., proponis sin tuj fari disponojn por publikigi parton de tiu scio pri la materi-kaj konsciaspektoj de la ekzistado, kiu ĝis tiam estis instruata en la esoteraj sciordenoj.

²⁴La homaro, troviĝante en la civilizacia stadio, tiom evoluis en mensa rilato, laŭ ilia opinio, ke ĝi povus intelekti la hilozoikan mensan sistemon de Pitagoro. Pro tio estus forigita la malfacilaĵo kolekti tiujn, kiuj ĉi tiun scion havas latente, en tiujn sciordenojn, kie ĉi tiuj antaŭaj inicitoj povos rememori sian antaŭan scion. Aldone oni povas esperi, ke ĉi tiuj siavice kontribuos al la prikonatiĝo de la tiurilataj kaŭzalaj ideoj, per tio kontraŭagante al la kreskanta agnostika sinteno, kiu forĵetas ĉion superfizikan.

²⁵Ĉiuj aliaj anoj de la hierarĥio voĉdonis kontraŭ la propono, ĉar ili opiniis, ke tro malmultaj homoj atingis tian mensan evoluon, ke la projekto havas ŝancon por prospero. La regantaj emociaj iluzioj de la religioj kaj la mensaj fikcioj de la filozofio estas tiel malproksimaj de la ĝusta konceptado de la realo, ke ĉiu provo sciigi al la tiel nomataj edukitoj superfizikan scion aŭ senceremonie malakceptiĝus aŭ rezultigus novajn fantaziajn ekscesojn. Oni devu atendi, ĝis almenaŭ la plejevoluintoj akiros fizik-eteran objektivan konscion. Tiam ili komprenos la fikciecon de la konceptado pri la realo de la regantaj idiologioj kaj montriĝos pli volontaj almenaŭ ekzameni la realecon de la esoterika mensa sistemo.

²⁶Pro neatingo de unanimeco ili transdonis la aferon al la prezidanto de la registaro, la planeda reganto, kiu opiniis: "Ĉar ĉi tiuj du fratoj niaj proponis sin fari preparojn por la disvastigo de la scio kaj deklaris sin volantaj mem porti ĉiujn sekvojn kaj scias, kion tio implicas, tial devus esti permesate al ili fari la provon."

²⁷La tempopunkto de la publikigo de la scio difiniĝis je 1875. Dumtempe oni ĉiel agu por plialtigi la ĝeneralan klorecon kaj por disvastigi la legoscion.

²⁸La unu el ĉi tiuj du fratoj certe ĉiuj konas el la historio. En sia konata enkarniĝo lia nomo estis Pitagoro. Li ankaŭ estas difinita estro de la 2-a departemento de la planeda hierarĥio, kiam ĝia nuna estro, Ĥristos-Maitrejo, foriros de nia planedo por pluigi sian interstelan konsciekspansion. La alia estas la estonta estro de la 1-a departemento. La hindoj havas deantikve titolojn de ambaŭ ĉi tiuj oficoj: manu kaj bodhisattva.

²⁹La du fratoj tuj ekagis. Farenda estis la ekzameno pri tio, kiuj el la malnovaj esoterikistoj estos enkarniĝintaj en 1875, kies bona rikolto ebligas al ili esti pioniroj, kiuj volos preni sur sin la taskon de martireco de la vero. Antaŭvidenda estas fortega kaj maldolĉa batalado flanke de la tuta mondo religia, filozofia kaj scienca, kiel rezulto de ĉi tiu "revelacio". La pionirojn oni konsideros kiel ĉarlatanojn kaj trompistojn aŭ, en plej bona okazo, malprudentajn naivulojn, aŭ halucinitojn, psikopatologiajn aĉaĵojn.

³⁰Tamen, la du menciitaj membroj de la planeda hierarĥio neniel ĝuis plenan liberon en la decidado pri tio, kiuj faktoj estu permesitaj por publikiĝo. Ilia estro, kiu gardu super la tuta afero, aldone alvokis plurajn fratojn kun la sama speco de mikonscio (45-monda konscio). Oni pliigis la aktivecon de la esoteraj sciordenoj kaj iliajn anojn oni stimulis por ke ili elpaŝu kun verkoj, preparontaj la publikon por la venonta diskonigo pri realo superfizika.

³¹Meze de la 19-a jarcento en Usono ekestis nova "movado", nomata de ĝiaj anoj spiritismo, pli malfrue ŝanĝita en spiritualismon. Ili asertis, ke "la spiritoj en la astrala mondo" de mortintoj povas komuniki kun homoj en la fizika mondo pere de "mediumoj", kiuj posedas la kapablon pruntedoni al tiuj "spiritoj" sian organismon kun ĝia etera kovrilo (ĝuste tiujn du kovrilojn, kiujn forlasas la homo, kiam li dormas, kio ebligas dormon efektivan). La movado havis grandan disvastiĝon kaj iom post iom sufiĉe vastan literaturon.

³²Tiu speciala peranto, Blavatsky (alinome Paracelsus, alinome Cagliostro), kiun la planeda hierarĥio difinis por diskonigi la universalan fratecon de ĉiuj vivaĵoj kaj samtempe doni al la mondo la plej unuajn faktojn de la esoterika scio, ricevis la ordonon aliĝi al la spiritualisma movado, provonte gvidi ĝin en vojon farantan ĝin "societo religi-filozofia" kaj platformo por esoterika diskonigado. Ŝi veturis al Novjorko kaj, en oktobro de 1874, de tie pluen al Chitten-

den en Vermonto, kie la du famaj fratoj Eddy aranĝis siajn spiritismajn seancojn. Sed kiam aperis la libro "Izisa" de Blavatsky, la spiritistoj rompis la rilatojn, fariĝante malamikoj tiel nepacigeblaj kiel la mondo cetera.

³³Blavatsky certigis, ke la "spiritoj en la astrala mondo" de la mortintoj tute ne estas tiel ĉiosciaj, kiel asertis la spiritistoj, kaj ke ili malhavas la antaŭkondiĉon por doni al la homaro scion pri la ekzistado. Oni ne povas akiri en la emocia mondo pli da kompreno de la ekzistado ol en la fizika. Ĉio en tiu mondo estas trompa.

3.2 La publikigado de la esoterika scio

¹Kiam la planeda hierarĥio finfine decidis, ke ĝia ekzisto povu esti konata (unuafaje post Atlantido) kaj la scio sekretigita povu publikigi, tiu instrumento, kiun ĝi elektis por tio, troviĝis en malcertega situacio, certe ne trodirite. Sur Blavatsky estis metita la devo ne liveri iujn ajn esoterikajn faktojn sen rekta permeso en ĉiu unuopa okazo. Ŝi ne havis permeson menciigi ion pri la planeda hierarĥio. Koncerne la kovrilojn de la individuo ŝi devis en la komenco teni sin je la terminoj de la gnostikistoj (korpo, animo kaj spirito). En okazo de bezono de aŭtoritato – sur kiu ĉiu devas sin apogi por esti kredata de homaro, kiu ne posedas eĉ la povon decidi tion, kio estas ebla aŭ verŝajna – tiun bezonon kontentigu la hindaj "riŝoj" aŭ Éliphas Lévi (la fama kabalisto) aŭ "rozkrucanoj", reklamataj de romanisto Bulwer-Lytton.

²La veron aŭ la scion pri la realo oni povas nur per malabundaj faktoj iom post iom komuniki al la homaro nepreparita. Oni devas trovi kontaktajn punktojn inter ĝi kaj antaŭaj fikcioj, pri kiuj la homoj sufiĉe aŭdadis por ke ili kredu, ke ili komprenas tion, pri kio temas la afero. Novan, revoluciigan idesistemon ili senceremonie malakceptus kiel fantazian fikcion. Sen zorgoplena preparo ĝi ne povus esti konceptata, des malpli komprenata.

³La plej grava kialo, kiun ja nur esoterikistoj povas kompreni, estas tio pri la dinamika energio de la ideoj. Ĉiu ideo estas mensa atomo energiŝargita. Se tiaj atomoj sukcesas penetri en cerbajn ĉelojn ricevemajn al tio sed ne vivigitajn per similaj anataŭaj mensaj molekuloj, tio povas rezultigi psikan malekvilibron. Tuta sistemo povas esti mensa haoso. Ofte temas pri gardago denatura, kiam multaj homoj instinkte sin deturnas de ideoj tro revoluciigaj. Ĉiu-okaze ŝanĝo de rigardmaniero kun elimino de mensaj molekuloj enteksitaj ĉiam implicas streĉon, precipe se ĉe tio oni devas "oferi" la emociajn molekulojn de amataj iluzioj. Tiam kaj mensa kaj emocia haoso povas rezulti.

⁴La du ĉefaj verkoj de Blavatsky estos priskribitaj en aparta ĉapitro, kiel ankaŭ tiuj de tri el ŝiaj disĉiploj, Sinnett, Judge kaj Hartmann. Ŝiaj du plej eminentaj estis Besant kaj Leadbeater, kiuj kapablis mem fari esplorojn en la homaj mondoj.

⁵Kun la permeso publikigi la esoterikan scion ĉesis la neceso de iniciĝo en la malnovajn sciordenojn, kaj tial neniu estas incita en ilin de post 1875. Vere la iniciĝoj de antaŭaj enkarniĝoj ne havis okazon revivigi ĉiun sian scion antaŭan. Tamen sufiĉan multon da ĝi oni konigis kaj cetere aludis per sugestetoj, tiel ke ili povis mem malkovri la plej esencan.

⁶En la sekvaĵo estos liverita mallonga sumiĝo de tiuj faktoj, kiujn iom post iom oni permesis por publika kono.

⁷La plej gravaj esoterikaj faktoj, kiuj troviĝas en la verkoj de Sinnett, Judge kaj Hartmann kaj kiujn tiuj verkistoj ricevis de la planeda hierarĥio pere de Blavatsky ĝis la jaro 1891, estas la jenaj:

- la reenkarnejo
- karmo aŭ la leĝo pri semado kaj rikoltado (la leĝo de rikoltado)
- la antaŭekzisto kaj postekzisto (sekve senmorto) de la individuo
- la ekzisto de la mondoj 45–49
- scio pri la kovriloj de la individuo en pli altaj mondoj
- sciordenoj en tempoj pasintaj
- amasoj da historiaj faktoj

⁸Faktoj pri la reenkarriĝo montris la erarecon de la hinda doktrino pri "metempsikozo", laŭ kiu oni kredas, ke estas eble por la homo renaskiĝi kiel besto. La esoteriko klarigas, ke retroiro de pli alta al pli malalta naturregno estas nebla. Faktoj pri la leĝo de rikoltado montras, ke la leĝo de kaŭzo kaj efiko estas leĝo universala, validanta en ĉiuj mondoj de la tuta kosmo kaj por ĉiuj tri aspektoj de la ekzistado.

⁹Ĉar la verkojn de Sinnett, Judge kaj Hartmann oni ankoraŭ grandparte uzas kiel lernolibrojn, mallonga raporto pri la pli gravaj eraroj de tiuj verkistoj devus esti lumiga por tiuj, kiuj volas ekzameni la enhavon de realo de la teozofia scio. Tiuj eraroj ankaŭ estas la klarigo de la ĝenerale neklaraj konceptoj ĉe la teozofoj. La komentarioj celas faciligi la komprenemon pri mankoj en ĉi tiuj penoj plej unuaj kaj pri iliaj kialo. Montras la komentarioj ankaŭ, kiel faktoj pli malfrue aldonitaj kompletigas la originan prezenton.

¹⁰Ĉe la morto de Blavatsky en 1891 finiĝis ĉi tiu unua periodo de la publikigado de novaj esoterikaj faktoj. Nek Sinnett nek Judge nek Hartmann kapablis mem konstati faktojn en pli altaj mondoj, sed tute dependadis de tiuj, kiujn ili povas ricevi per Blavatsky persone aŭ el ŝiaj skriboj.

¹¹La sekvan periodon, etendiĝantan de la jaro 1894 ĝis la jaro 1920, karakterizas intima kunlaborado de du kompetentuloj esoterikaj: Annie Besant (1847–1933) kaj C.W. Leadbeater (1847–1934). Blavatsky ilin renkontigis kun siaj instruantoj, kiuj klarigis al ambaŭ, ke vere ĉion oni faros por faciligi ilian pluan laboron, sed ili, estinte inicitoj de la plej alta grado de la gnostiko, havas la antaŭkondiĉojn por mem akiri kaŭzalan sensadon (objektivan konscion en la kaŭzala kovrilo) kaj per tio la povon fari proprajn esplorojn en la homaj mondoj.

¹²En la komenco ili kompilis kaj sistemigis tiujn faktojn, kiujn amasigis Blavatsky en siaj verkoj. Post tio sekvis esplorkonferenco, kiu, precipe koncerne al Leadbeater, rezultigis verkaron unikan kaj kvalite kaj kvante. Neniu antaŭ li liveris tiel multajn novajn faktojn. Li esatis la plej elstara sistemigisto kaj historiisto de la esoteriko ĝis 1920. Devis esti neeviteble, ke li faris multajn erarojn ĉe siaj treege vastaj ekzamenoj de kampoj ĝis tiam neesploritaj. Mirige estas pliĝuste, ke ili ne estas pli multaj kaj pli gravaj.

¹³Estas eksterkadro al ĉi tiu libro la detala ekzameno de la verkoj de ĉi tiuj du kaŭzalaj mioj (havantaj esencialan konscion 46:5-7). La referaĵoj pri la antaŭmenciitaj verkistoj dependas de tio, ke iliaj prezentoj estas tro misinstruaj por ke ili povu resti nekontestitaj.

¹⁴El tiuj novaj fundamentaj faktoj (necesaj por kompreni la realon), kiujn Leadbeater pritraktis, estas la plej gravaj la jenaj:

- la kunmetiĝo de la materio
- la diferenco inter atoma kaj molekula materio
- la sep atomaj mondoj de la sunsistemo
- la molekulaĵoj de la planeda sistemo
- la involuadita materio
- la evoluado de la naturregnoj
- la konsciekspansio per akiro de ĉiam pli vastiĝanta kolektiva konscio
- la tri atomaj mondoj kaj la kvin molekulaĵoj de la homo
- la kvin materiaj kovriloj de la homo kaj la konscio en ĉi tiuj
- la konstantaj atomoj (la triado) de la homo
- la planeda hierarĥio
- la dividiĝo de la planeda hierarĥio en sep departementojn
- la planeda registaro

¹⁵Bedaŭrinde Leadbeater (inicito de malaltaj gradoj) neniam konsideris la Pitagoran scisistemon (la hilozoikon), kiu estis intencata fariĝi la estonta scibazo de la okcidenta scienco. Eble la kialo de tio estis, ke li sentis instinktan malemon al la filozofaj malplenaj analizoj de konceptoj sen enhavo de realaĵo, al filozofoj, kiuj opinias, ke diseretigante la fikciajn konceptojn ili povas ricevi realecan rezulton.

¹⁶Sentebla manko ĉe Leadbeater do estas pritrakto de la Pitagora hilozoika sistemo de la realo, priskribo pri

la tri aspektoj de la ekzistado

la dinamika energio de la pramaterio

la ses diregnoj en la kosmaj mondoj 1–42

la monado kiel praatomo

la praatomo kiel la mio, la individuo

la praatomo kiel la pramio en ĉiuj kovriloj de la individuo en ĉiuj mondoj de la tuta kosmo. La mioj estas praatomoj. Ĉio alia estas nur "kovriloj".

¹⁷En la komenco Besant kaj Leadbeater esploradis kune. Iom post iom tamen Besant pli interesiĝis pri Hindio. Ŝi starigis universitaton en Benareso. Ŝi kunlaboris kelkatempe kun Gandhi por la memregado de Hindio, kvankam ŝi diverĝis de li pri la finfina forŝiriĝo disde Grandbritio.

¹⁸La tria kaj lasta fazo de la publikigado de la esoterika scio estas inter 1920 kaj 1950. Multaj ŝanĝiĝoj jam okazis interne de la planeda hierarĥio. Multaj individuoj de la homaro fariĝis kaŭzalaj mioj, kaŭzalaj mioj fariĝis esencialaj (46) mioj, tiaj siavice fariĝis super-esencialaj (45) mioj kaj tiel plu, kaj ne malmultaj ĝistiamaj 43-mioj sukcesis akiri 42-mondan konscion, la plej malaltan kosman konscion, kaj per tio eniris en la "kosman karieron".

¹⁹La planeda hierarĥio estis difininta "sekretarion", kiu estu la efektiva kuniga ĉenero inter la esoterikistoj kaj la planeda hierarĥio, kaj decidinta, ke novajn faktojn ĝi liveros, almenaŭ provizore, nur pere de tiu, 45-mio D.K. (alinome Kleinias, alinome Dharmagjoti, alinome Arjasango).

3.3 H. P. Blavatsky (1831–1891)

¹Helena Petrovna von Hahn estis riĉa rusa nobelino, kies vivo ĝenerale estis nura martiĝado. Ŝi neniam ricevis fundamentan edukadon. Superfizikaj dispozicioj denaskaj faris ŝin obstina jam kiel infano. Ŝi ridis je la francaj kaj anglaj gubernistinoj, kiuj provis lernigi al ŝi okcidentlandan "kulturon". Kiam ŝi havis dek sep jarojn, ŝi spitcele edziniĝis al la guberniestro, generalo Blavatsky, kiu estis proksimume 50 jarojn pli maljuna ol ŝi, fuĝis de li en la geedziĝa nokto kaj vojaĝis eksterlanden. Estante riĉa, ŝi povis sin dediĉi al vojaĝoj tra la tuta mondo, dum kio ŝi disvolvis siajn latentajn dispoziciojn, reaktivante kiel mensan tiel ankaŭ kaŭzalan sensadon (objektivan konscion en la mensa kaj kaŭzala kovriloj). Dum loĝado ĉe 45-mio ŝi konsciiĝis en sia cerbo, ke ŝi estas kaŭzala mio.

²Bonaj biografioj pri ŝi estas *Some Incidents in the Life of Mme Blavatsky* de Sinnett kaj *The Real H. P. Blavatsky* de W. Kingsland (Londono 1928).

³Tiu originala persono estis dum sia tuta vivtempo multe mallaŭdata pro sia kontraŭstaro al ĉiaspeca konvenciismo, ŝajnegado kaj hipokritado; estis ŝi teruro al ĉiuj sklavoj de konvencio kun ilia infaneca sinteno. Pli malfrue ŝi bedaŭris, ke per tio ŝi forpelis multajn homojn. Tamen veraj serĉantoj estas sendependaj de la morala fikciismo. Homaj tiel nomataj sanktuloj estas emociaj geniuloj, sed nur tial ili ne posedas scion pri la realo. Veraj "sanktuloj" ekzistas nur en regnoj superhomaj. Ili neniel respondas al la sanktula idealo de la moralfikiistoj.

⁴Blavatsky fine ekloĝis en Nov-Jorko, kie ŝi en la jaro 1875 partoprenis la fondon de Teozofia Societo laŭ la deziro de la multaj intelektuloj, kiujn kaptis ŝiaj grandega sciado kaj malfalsaj magiaj eksperimentoj.

⁵Tiuj pruvoj de superfizika scio devus ne esti donitaj. Kiuj malhavas la antaŭkondiĉojn por kompreni tiurilatajn aferojn, tiuj fariĝas nur aro da nefidindaj babilaĉuloj, kiam ili estas klarigontaj tion, kion ili ne povas kompreni. Tio malutilis al la afero de la esoterika scio, sed utilis al ĉiaspecaj trompisto. Estas ja bone, ke tia agado estas nune malpermesita de la planeda hierarĥio, kaj ĝi restas malpermesita, ĝis la hilozoiko estos ĝenerale akceptita kiel la sola racia labora hipotezo. La scio estas la nura gravaĵo, ne la fenomenoj.

⁶En Nov-Jorko en 1877 Blavatsky verkis *Isis Unveiled* ("Izisan senvualigitan"), verkon konsistantan el du partoj. La unua parto (de 628 paĝoj) estas kritiko de la dogmoj sciencaj, la dua parto (de 649 paĝoj) kritiko de la dogmoj teologiaj. Kiel prava estas tiu kritiko, tio ĝis nun evidentiĝis ĉiam pli.

⁷Ŝi komprenigis al siaj amikoj, ke la verko altiros sur ŝin nur miskomprenojn, klaĉadon kaj nepacigeblan malicon. Tio ja estas neevitebla en la nuna evolustadio de la homaro. Sed ŝi plenumis tion, kio estis al ŝi komisiita.

⁸"Izisa" estas monstra verkego. Ŝajnas nekredeble, ke unu homo sen fundamenta edukado, sen sciencaj studoj aŭ alia lernado, povis plenumi tian faregon atestantan preskaŭ ĉioscion pri la historio, kaj tio, krome, sen eĉ la plej malgranda referenca libraro je sia dispono.

⁹La asertoj de sciencaj aŭtoritatuloj, ke Blavatsky ĉerpis la tuton el fontoj jam ekspluatitaj de la scienco ("Izisa" abundas je citaĵoj el verkoj de erudiciuloj), falas per sia propra absurdeco. Ankoraŭ hodiaŭ tia elfaro superas la kapablon de ĉiuj. Sed koncerne "Izisan" tiaj asertoj (sian "Sekretan doktrinon" oni saĝe preferis mortigi per silentado) estas nune tradiciaj. La neniiganta kritiko, fare de Blavatsky, de la mallongevivaj hipotezoj de la scienco kaj de la malesto de sana prudento en la teologio jam estis tro malkaŝa. Misfamigo de ĉiu speco, por kiu estas kapabla la homa fantazio (ĉiam pruvita laŭ la principo de "ne ekzistas fumo sen fajro"), estis verŝata sur tiun virinon, kiu aŭdacis defii la plej famajn aŭtoritatulojn de tuta mondo, kiu kuraĝis ekspliki la senvalorecon de iliaj sagacaĵoj kaj profundaĵoj.

¹⁰La sciencistoj, fantaziante ke ili povas juĝi, kio "kontraŭas al la leĝoj de la naturo", kompreneble deklaris neeblaj ŝiajn malfalsajn magiajn eksperimentojn. Tiujn sciencistojn, kiuj post la plej skrupula kontrolo konvinkiĝis, oni ridindigis, ĉar, laŭdire, ili lasis sin trompi aŭ halucini. Oni neniam povas konvinki tiujn, kiuj "scias, ke tia afero estas neebla". Ili neniam konvinkiĝos antaŭ ol, iufoje en la estonteco, ili mem povos plenumi la samajn eksperimentojn. Ili kredas pli siajn dogmojn ol la sanan prudenton kaj la ateston de siaj propraj sensoj. Sekve oni neadis la sennombrajn pruvojn de Blavatsky pri tio, ke la mensa energio regas la fizikan materion, kaj oni deklaris ŝin la plej granda trompistino de la 19-a jarcento. Tiel oni ja agu! Tiel oni ja senvivigu homojn en la scienca maniero, aŭ oni metu ilin en frenezulejon, kie ili primeditu, kiel iros la aferoj, kiam oni aŭdacas prezenti veraĵojn nekompreneblajn por la aŭtoritatuloj. Oni tamen plihumanigis. Pli frue oni kutimis ilin ŝtiparumi.

¹¹Kompreneble Blavatsky estis por ĉiuj perfekta enigmo. Kiel do ili komprenus mion kaŭzalan? Ŝi neniam ĝuis ian edukadon, neniam studis eĉ unu verkon prisciencan (necesese, ĉar ŝi tuj povis scii ĝian enhavon, se dezirante tion). Kaj tamen ŝi kapablis doni klarajn informojn pri ĉio demandata al ŝi, kaj solvojn de problemoj, pri kiuj la sciencistoj ankoraŭ disputadas.

¹²Profesoroj pri beletro aŭ psikologio okupiĝas pri malabundaj konigoj, kiuj povas esti atribuatataj al okazaj esprimoj de la enkarniĝaj kovriloj, baldaŭ dissolviĝontaj, de la individuo, sed ili havas nenian koncepton pri la evolunivelo de la mio en la kaŭzala kovrilo.

¹³Ŝia manko de edukado, tamen, havis palpeblan malavantaĝon. En sia cerbo ŝi estis nekapabla por metoda kaj sistema pensado, kio malutile efikis sur ŝian manieron de prezentado. Ŝi abomenis ĉion de la kategorio de mensa sistemo, kvazaŭ malhelpon al korekta konceptado de la realo, neniam respondantan al la ordo de la naturo. Ŝi opiniis, ke ili paralizas la pensadon pro la mensa nmoveblo en rigida sistemo. Tamen ili estas necesaj en mensaj niveloj, por ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne estas kaŭzalaj mioj. Ili estas mensaj garantioj pri tio, ke faktoj estas metitaj en siajn ĝustajn kuntekstojn. Ili klarigas la sciadon, kia ĝi estas en certa nivelo, kaj plifaciligas superrigardon kaj orientiĝadon. La tuta mensa evoluado de la homaro respreguliĝas en serio da mensaj sistemoj. La kaŭzala mio ne bezonas mensajn sistemojn (necesajn por doni al la mensaj ideoj ilian ĝustan skeleton), ĉar la kaŭzalaj ideoj mem estas seneraraj sistemoj kaj faktoj, ĉiam enmetitaj en siajn ĝustajn kuntekstojn.

¹⁴La titolo de ŝia verko estas misgvida. Same kiel ĉiuj ŝiaj aliaj titoladoj ĝi atestas ŝian malhavon de formala edukado.

¹⁵Izisa ne estis senvualigita. Se sub vualo oni komprenas la kaŭzalan nekonscion de la mio en la kaŭzala kovrilo, tiam tiun vualon povas levi nur la mio, akirinte kaŭzalan konscion. (Sur la plinto de la statuo de Izisa: "Neniu mortemulo iam levis mian vualon.") Se oni komprenas la veran scion pri la realo, ĝi ne troviĝas en la libro. Sed, kiel diris iu 45-mio, "en la vualo estis faritaj ŝiroj sufiĉe grandaj por enlasi pasajn ekrigardojn." Kaj tio ja estis la intenco.

¹⁶Ĉar Blavarsky ricevis la ordonon ne publikigi iun novan esoterikan fakton sen permeso en ĉiu aparta okazo, ŝi estis limigata al la uzado de la historie konataj terminoj, kiujn la nescio jam sensencigis. Ĉar ŝi ne povis diri la veran staton de la aferoj, ŝi povis nur lasi la erudiciajn aŭtoritatulojn de ĉiuj tempoj sin refuti reciproke, kaj aludi, ke nur la inicitoj de la esoteraj sciordenoj povas ekspliki tion, pri kio la erudiciuloj devas ĉiam disputi.

¹⁷Do ŝi havis treegan handikapon ekde la komenco. Estas ja neeble malimpliki tiajn fikciojn kiel la spirito-materion de la zoroastranoj, la korpon, animon kaj spiriton de gnostikistoj, la nociojn pri dio tra la tempoj kaj tiel plu; kiam la uzo de la ekzaktaj realecaj konceptoj ne estis permesata.

¹⁸Penante prezenti tian, por kia okcidentaj lingvoj ne havas vortojn, ŝi malsukcesis. Ŝia terminologio (ankoraŭ hantanta) estas de prima afero kaj, bedaŭrinde, estas kontraŭaginta al la enkonduko de laŭcela okcidenta terminologio.

¹⁹Jam la nomo "teozofio" estas misa, eĉ se ĝi estas antikva aleksandria, signifanta "dian saĝon". La homo ne havas la eblon kompreni la koncepton de dio pri la realo. La opinio, ke teologio estas la scienco pri la diaj aferoj, apartenas al la fikciismo teologia.

²⁰Same malbone stas al ĉio superfizika. Kelkaj ekzemploj sufiĉu!

²¹La antikvuloj komprenis sub "astrala" la fizikan eteran mondon. Ĉe Blavatsky la vorto eksignifis ĉion superfizikan. Ŝi uzis ĝin en ĉiuj kuntekstoj: astrala mondo, astrala mio, astrala lumo kaj tiel plu. Ŝia disĉiplo Judge estis plene konfuzita kaj intermiksitis fizikan etermondon (49:2-4) kaj emocian mondon (48:2-7) en nuran galimation. La fakto, ke materioj de pli altaj specoj estas lumantaj en siaj mondoj, ne pravigas nomi ilin astrala lumo.

²²Ĉar ŝi devis ne paroli pri pluraj specoj de pli altaj mondoj, tial ŝi lanĉis la "astralan mondon" kiel nomon de ĉiuj. Kaj la "astrala lumo" fariĝis la termino de ĉiuj pli altaj specoj kiel de materio tiel ankaŭ de energio.

²³Alia ekzemplo estas "akaŝo" (mondo 44), kiun ŝi uzadis por preskaŭ iu ajn mondo.

²⁴Ankaŭ la informo pri la "sep kovriloj" de la mio devenas de Blavatsky, kiu deiris de tiuj idealoj, kiujn ŝi havis antaŭ la okuloj, tiuj 45-mioj, kiuj estis ŝiaj instruantoj. Ili havas sep kovrilojn, sed ili ne estas anoj de la kvara naturregno.

²⁵Por la esoterikisto estas facile kompreni, kial Blavatsky neniam diferencis la fizik-eteran mondon kaj la emocian mondon, ĉar ŝi ne posedis emocian kovrilon aŭ, pli ĝuste esprimita, ŝia emocia kovrilo estis malplena je ĉia enhavo. (Ĝuste tial fumado ne povis efiki sur la emocian kovrilon.) Tio ĉiam estas la fakto pri tiuj, kiuj akiris kaŭzalan sensadon (posedas objektivan konscion en la kaŭzala kovrilo). Ili jam ne bezonas sian emocian konscion, kaj tiu kovrilo nune estas nura komunikilo al la etera kovrilo. La responda validas por tiuj, kiuj akiris esencialan konscion. Ilia ankaŭ mensa kovrilo estas "malplena", ĉar ili jam ne bezonas la mensan konscion. Tio ne signifas, ke ili ne havas komprenemon pri la konscispecoj de la tiurilataj vibradoj. La pli alta entenas la pli malaltan. Ioman maloportunaĵon tamen tio sekvigas al tiuj, kiuj estu instruantoj de homoj, ĉar implicas veran sinoferon vive reprezentadi al si la ĝeneralan kaj individuan emocian iluziecon kaj mensan fikciecon, tiel malproksimajn de la ĝusta perceptado de la realo.

²⁶Ĉar Blavatsky povis nur aludi la fontojn, ne menciante, ke de antaŭ preskaŭ 50 000 jaroj jam ekzistas sekretaj sciordenoj, tial restis al ŝi malmulte pli ol sin apogi sur la "pratempa sekreta saĝo de Hindio" kaj de tie derivi ĉiajn efektivajn scion kaj komprenon. Ŝi povis disdoni laŭdojn tro malavare, se ŝi bezonis utiligi malnovegajn "aŭtoritatojn" konatajn de la scienco. Iufoje tio estas por la esoterikisto certe ekscesa. Tiele ŝi povis diri, ke la gnostiko

estas la esena doktrino sub alia nomo. La esenoj estis kabalistoj de certa speco, kaj ilia paperpapo estis malbona prilaboraĵo de la hermetiko, adaptita laŭ la ŝanĝita mondrigardo de pli malfrua tempaĝo.

²⁷La fakto, ke "Izisan" oni ĉiam malkaŝe primokis, ne malhelpis al sciencistoj ĉerpadi el tiu ormino de faktoj antaŭe nekonataj kaj, ne menciante la fonton, publikigi ilin kiel proprajn malkovrojn kaj pro tio rikolti la famon. Tio, laŭ Schopenhauer, estas la sorto, kiun la geniulo dividas kun la leporo: oni pafas al li dum li vivas kaj, lin feliĉe senviviginte, oni festenas el li.

²⁸La dua ĉefverko de la vasta literatura produktado de Blavatsky estas *The Secret Doctrine* ("La sekreta doktrino"), kiu en ĝeneralaj trajtoj pritraktas la simbolarojn de kelkaj el la esoteraj sciordenoj. Oni povas rigardi ĝin, same kiel "Izisan", kiel superhoman faraĵon. Plue oni pripensu, ke en la tempo de la verkado Blavatsky estis maljuniĝanta malsanulino markita de la morto kaj laboranta ĉe la plej suferigantaj eksteraj cirkonstancoj.

²⁹La verko estis skribita dum la jaroj 1885–88, kiel ĉiam sen havo de eĉ plej malgranda referenca libraro. Same kiel "Izisa" ĝi estas ŝtopita per citaĵoj el la plej raraj libroj kaj manuskriptoj, kiujn ŝi neniam vidis!! Kion tio signifas, la esoterikisto komprenas. Kiel "Izisa" ĝi konsistas el du dikaj volumoj. La unua temas pri la kosmo, la dua pri la homo. Ambaŭ volumoj havas analogajn partojn: la kreo, la simbolaro pri tio de la antikvuloj kaj kritiko pri la tiurilataj hipotezoj de la samtempa scienco.

³⁰Trian volumon (tiel nomatan) eldonis Besant post la morto de Blavatsky. Ĝi enhavas grandan nombron de postrestantaj (ŝajnus, ne finverkitaj) eseoj pri diversaj esoterikaj temoj.

³¹"La sekreta doktrino" ne estas facile legata verko por needukitaj en la esoteriko, nekonataj la tiurilatajn simbolojn. Sisteman superrigardon de la esoterika scio pri la realo oni ne atendu. La verko enhavas la simbolojn de "Dzyan" (la plej malnovajn de la planeda hierarĥio). Ĝi priskribas la diversajn simbolajn prezentojn fare de pluraj sciordenoj pri la kosmo kaj pri la evoluado de la vivo, kaj montras ilian reciprokajn akordon.

³²La antikvaj esoteraj skriboj estis tratute nekompreneblaj por neinicitoj. Al eksteruloj ili ŝajnis plena galimatia. Ili same ŝajnas al la erudiciuloj ankoraŭ hodiaŭ. Certaj aferoj ŝajnas havi iun sencon. Sed se ili estas laŭlitere interpretitaj, la rezulto estas superstiĉo. Kiel ekzemplojn oni povas mencii la konatajn helenajn mitojn, kiuj grandparte devenas el tia literaturo. La hindajn skribojn, Upaniŝadojn kaj Vedojn, oni povas plejparte alkalkuli al tiuj. La plej instruitaj bramanoj eraras, se ili kredas, ke ili povas interpreti ilin.

³³Aldone al ĉi tio oni ekscias historiajn faktojn amase, kiuj klarigas la nefidinceon de la rgantaj fikcioj kaj demonstras la nescion de la erudiciuloj.

³⁴Multon ŝi sugestetis, kiu estos valora por la esploristoj kaj faciligos la interpreton de la ideenhavo, kiam, iufoje en la estonteco, la antikvaj esoteraj, bone konservitaj manuskriptoj ree vidos la taglumon. La esoterikistoj apenaŭ trovas malfacile kompreni la sencon intencitan, eĉ se ili antaŭe ne konus ĉiujn diversajn simbolajn lingvojn. Ankaŭ tio estas por ili pruvo (se pruvoj necesus), ke la informoj de Blavatsky estas fidindaj.

³⁵Eble oni devus mencii, ke Blavatsky, verkante, interpretis pli, ol kion la planeda hierarĥio tiam opiniis konvena, kaj tial preskaŭ duonon de la prespretaj manuskriptoj oni devis foroferi al la flamoj. Ĉi tie, kredeble, oni serĉu la klarigon de tio, kial amasoj da faktoj trafis en malĝustajn kuntekstojn, disigitaj tra ambaŭ volumoj. Tio kaŭzis, ke la verko aperas pli enciklopedia ol sistema traktaĵo.

³⁶Kompreneble, Blavatsky sciis, kian akcepton ricevos ŝia verko. Kaj certe oni ĝin mortigis per silentado. Ŝi diris, ke tiu sciencisto, kiu kuraĝus konfesi, ke li iel atentis pri la verko, farus sin netolerebla. Prave ŝi diras, ke "neniu veraĵo iam gajnis agnoskon de iu erudicia societo, krom se ĝi akordis kun la antaŭformitaj opinioj ĝenerale havataj de ĝiaj membroj", kaj ke "niaj fikcioj nin blindigas al nia propra nescio". Ĝis la individuo fine komprenos la treegan limitecon de la emocia kaj mensa konscio, li estos nehelvebla viktimo de siaj emociaj iluzioj kaj mensaj fikcioj.

³⁷Al tiuj, tamen, kiuj iufoje estis inicitoj kaj tiel restis serĉantoj de la ”perdita diro de la majstro” aŭ la ”filozofa ŝtono”, tio efikis kiel revelacio. Tiel multe ili rekonis, ke ili sciis, ke finfine ili trovis tion, kion ili jam instinkte serĉis; kaj nun ili sciis la direkton de sia plua serĉado por rememori tiun scion, kiun ili iam posedis.

3.4 Sinnett

¹Alfred Percy Sinnett (1840–1921) estis dum multaj jaroj ĉefredaktoro de la angle eldonita gazeto *Pioneer* en Hindio. Konatiĝinte kun H.P.B. en 1880, li invitis ŝin al sia hejmo. Post kiam li dum pluraj semajnoj vidis malfalsajn magiajn fenomenojn kaj ricevis faktojn esoterikajn pli la racieco de la ekzistado, li ekhavis okazon, per la peranteco de H.P.B., korespondadi kun tiama 45-mio K.H. La rezulton de siaj travivaĵoj kun H.P.B. li registris en sia unua libro, *The Occult World* (”La okulta mondo”), kiun sekvis en 1883 studaĵo pri esoteriko, *Esoteric Buddhism* (”La esotera buddhismo”), kun materialo el la korespondado kun K.H., enhavanta tiujn faktojn, kiujn la planeda hierarĥio tiam permesis diskoniĝi. Ĉi tiu verko estas la unua provo de esoterika mondrigardo iam permesita por publikiĝo. Kaj Judge kaj Hartmann vaste uzadis la faktojn prezentitajn de Sinnett.

²La leteroj de K.H. de la jaroj 1880 ĝis 1884 entute publikiĝis en la jaro 1923, post la morto de Sinnett.

³En la sekvaĵo estos farita ekzameno de la ĉefa verko de Sinnett, ”La esotera buddhismo”, antaŭ ĉio tial, ĉar lian verkon oni ankoraŭ aperigas en novaj eldonoj malgraŭ tio, ke jam antaŭ longe ĝi devus eniri en la stakejojn de la bibliotekoj. Multaj fikcioj pluivantaj ĉe teozofoj povas esti respuritaj al tiu unua aŭtoritatulo pri teozofio. La komentarioj ĉi-tieaj celas rimarkigi la neĝustaĵojn. Eraroj estis neeviteblaj, se oni provus fari ion similan al sistemo, disponante tiel malmultajn faktojn. Konsidere tion, la verko de Sinnett estas miregiga lertaĵo, ankaŭ plue superota nur de la verkoj de Besant kaj Leadbeater, kaj tio nur dank’ al la amaso da novaj disponigitaj faktoj. Liaj elstaraj ecoj de ĵurnalisto trovis plenan esprimon. Kompreninte poste la mankojn, li konfesis en postskribo de la lasta eldono, ke, relegite, tiu lia provo de prezento de la esoteriko vekis ridemon en li mem. Ĝi do estis tiam ankaŭ por li nur historia dokumento. La risko de tia estas, ke ĝi ne tiel estas komprenata de legantoj nesciantaj, sed daŭre servas por disvastigi la antaŭajn miskomprenojn.

⁴Enkonduke Sinnett rimarkigas, ke sub buddhismo li komprenas ne precipe la doktrinon de Gotamo, sed la ”doktrinon de la saĝuloj” (derivita de buddhi = saĝo). La sveda traduko nomiĝas ”La doktrino de la inicitoj”, kio estas bli bona informo. Eble estas aldonende, ke la versio de Sinnett nur en certaj rilatoj akordas kun tio, kion oni instruadis en la malnovaj sciordenoj. La fakto, ke la perceptado de la realo fare de la planeda hierarĥio estas tute alia, sekvas el tio, ke ĉiu pli alta mondo alportas tute malsimilan perceptadon de la tri aspektoj de la realo.

⁵En la unua ĉapitro Sinnett parolas pri siaj instruantoj kaj tiel plu, provante priskribi la kapablojn de 45-mio. Tiaj klopodoj estas senfine tipaj por okcidentuloj.

⁶La dua ĉapitro temas pri la konstitucio de la homo. De Sinnett, kiel ankaŭ de ĉiuj aliaj teozofoj kaj iliaj epigonoj, li estas dotita per sep kovriloj. Tamen la homo havas nur kvin. La kovrilojn de la esencuala (46) kaj superesencuala (45) mondoj la individuo akiras en la kvina naturregno.

⁷La emocian kovrilon (48) Sinnett faras la ejo de la ”volo”. Efektive, tamen, tio signifas, ke la emocia materio estas tiu materio, en kiu la mio povas plej facile utiligi dinamison. Kaj tio montras la ĝeneralan evolustadion de la homaro, montras, ke ĝi sin trovas en la emocia stadio. Kiam, iufoje, la mio povos centriĝi sian mikonscion en la mensan (47) konscion, tiam tiu fariĝos la ”volo” de la homo.

⁸La tria ĉapitro temas pri la planeda ĉeno. Tiu ĉapitro povus esti ellasita sen perdo. La planeda ĉeno ne havas lokon en unua traktaĵo pri la fundamentaj faktoj de la esoteriko, kiujn

oni devas unue ellerni. Ĝi restas nekomprenbla por tiuj, kiuj ne havas scion pri la sep dimensioj de la sunsistemo (aŭ naŭ, se oni kalkulas linion kaj areon du). Ĉi tie estas intermiksitaj fundamentaj konceptoj, kiuj devus esti pritrakitaj unuope: la kunmetiĝo de la materio, la elkonstruiĝo de la mondoj, la evoluado en la diversaj naturreĝnoj en biologia kaj konscia rilatoj, la elementaloj de la involuado kaj tiel plu. Nur la havo de ĝustaj faktoj ne sufiĉas. Ili estas enmetendaj en siajn ĝustajn kuntekstojn. Sed la faktoj tiam ekzistintaj estis tro malmultaj por ebligi kuntekstojn komprenblajn por neinicitoj.

⁹Antikva esprimo ankoraŭ uzata en esoterikaj skriboj estas la "malsupreniro de la spirito en la materion", simbola esprimmaniero, kiun komprenble oni misinterpretis kaj kiu havas multajn diferencajn sencojn, interalie signifanta la involuadon (la kunmetiĝon de la materio el praatomoj) kaj la diversaspecajn involvadojn (la ĉiaman renaskiĝadon de ĉio, aŭ la kontinuan involvado kaj evolvado).

¹⁰Se sub "spirito" oni komprenas la konsciaspekton, tiam kaj ĝia graveco kaj tiu de la movadaspekto malpliĝas je ĉiu pli malalta mondo (pro pliĝanta denseco de praatomoj), dum la materiaspekto fariĝas ĉiam pli superrega. Tio validas precipe por la tri plej malaltaj atom-mondoj (47–49).

¹¹Jam la esprimo "spirito" estigis multajn neklerarojn. Ĝia ĝusta signifo estas la propra konscio de la monado (de la praatomo, individuo, mio). Sed ĉar ĉiuj scias, kion signifas "spirit", ne sciante kio estas spirito, tiu vorto fine alprenis la signifon de io ajn. La plimulto da teozofoj ŝajnas haltintaj ĉe tio, ke la vorto signifas la konscion de 45-mioj.

¹²Al la kvara ĉapitro de sia libro Sinnett donis la rubrikon "La mondperiodoj". Ĝi pleje temas pri la diversaj rasoj kaj pri certaj aliaj aferoj, por kies pritrakto tro malmultaj faktoj estis tiam disponeblaj. La plej grava eraro, tamen, estis lia provo deĉifri la simbolan numeron "777 enkarniĝoj". Sinnett neniam komprenis la signifon de la simbolo, kaj tial li kalkulis la necesan nombron de enkarniĝoj por la individuo en la homa regno je "nemulte pli ol 800". Eĉ hodiaŭ oni povas aŭdi teozofojn ripeti tiun numeron. La simbolo celis indiki la proporciojn en tempa rilato por la aktiviĝo de la tri specoj de konscio: 700 por la fizika, 70 por la emocia, 7 por la mensa. Sekve ĝi ne koncernas la nombron de enkarniĝoj. Blavatsky aludas al la proksimuma nombro, rilatigante ĝin al la taglaboroj por la konstruo de la templo de Salomono (II Kroniko 2:17,18), la simbola kaŭzala kovrilo de la legendo.

¹³La kvina kaj sesa ĉapitroj de la Sinnetta libro temas pri la restadoj de la individuoj en la emocia kaj mensa mondoj inter la enkarniĝoj. La gravecon de tiuj restadoj li ege trotaksis. Ili estas destinitaj servi kiel ripozaj periodoj, tute simple, dum la atendo de nova enkarniĝo. La individuo lernas nenion novan en tiuj mondoj. Ilia esploro estas nepre nefarebla por la normala individuo. Li ne havas eblon observi eĉ la kvaran dimension en la emocia mondo kaj la kvinan en la mensa mondo. Uzante la tridimensian vidipovon akiritan en la fizika mondo, li nenion komprenas da tio, kio okazas ĉirkaŭ li. Restas por li sole la provado prilabori tiujn iluziojn kaj fikciojn pri la ekzistado, la realo kaj la vivo, kiujn li kredis en sia organismo, sen la eblo malkovri ilian fikciecon. La individuoj aperas multe malpli raciaj en tiuj mondoj ol en la fizika. Evidente, des pli da homoj en la emocia mondo komprenos kaj proklamos la esoterikon, ju pli da ili studis ĝin jam en la fizika vivo de post 1875.

¹⁴Aperas ke Sinnett, kiel ankaŭ la spiritualistoj, havis nesanan inklinon al tiaspecaj fenomenoj, ne komprenante, ke la spertoj kaj opinioj de la individuo estas en plej alta grado personaj kaj subjektivaj. Precipe en la mensa mondo iaspeca ajn objektiveco estas senekzista. La individuo tie vivas senfinan vivon de beato, travivante la ŝajne objektivan efektivigon de siaj fantazioj. Nur en la emocia mondo li povas sperti malagrablaĵojn, ĉar tie kontakto kun homoj en la stadio de malamo estas ankoraŭ ebla.

¹⁵En iu loko Sinnett parolas pri "la elementaloj, la naturspiritoj, tiuj duoninteligentaj vivaĵoj el astrala lumo". Tio montras, ke Sinnett ne klare komprenis, kion signifas tiuj vortoj. Elementalo apartenas al la involuata materio, naturspirito al la deva-evoluado kaj astrala

lumo estas la sama kiel emocia materio.

¹⁶En la sepa ĉapitro, titolita "La homa vivondo", precipe du miskomprenoj estas rimarkigendaj. La unu koncernas Marson kaj Merkuron en la sunsistemo; la alia, la tempoperiodojn inter la homaj enkarniĝoj.

¹⁷Marso kaj Merkuro estas planedoj kun propraj planedaj ĉenoj, la solaj videblaj globoj en la respektivaj sepopaj globoj. La eraro dependas de tio, ke en la skriboj de la antikvuloj ankaŭ la du eteraj globoj de la planeda ĉeno de la Tero nomiĝadis Marso kaj Merkuro.

¹⁸Sinnett difinis la meznombran restadon inter enkarniĝoj je 8000 jaroj. Tio estas plena eraro. Sen scio pri la diversaj evolustadioj de la homaro oni ne scipovas difini tiujn periodojn eĉ proksimume. Estis kredate, ke oni povas kalkuli, ke en la barbara stadio kvin jaroj plej ofte sufiĉas, en la civilizacia stadio 300, en la kultura stadio 1000 kaj en la humaneca stadio 1500. Sed regulo ne ekzistas, kaj ĝenerale ĉio estas individua, pro multaj faktoroj. Iu ajn povas reenkariniĝi preskaŭ tuj. Iu ajn povas atendi dum milionoj da jaroj, dormante en sia kaŭzala kovrilo. Estas dirite kun emfazo, ke ĉiuj tiaj spekulativoj estas senvaloraj. Oni scias nur, ke la individuo enkarniĝadas laŭ serioj, kaj ke la nombro de enkarniĝoj en la serioj varias kaj ĝenerale kaj individue.

¹⁹La oka ĉapitro, pri "La progreso de la homaro", kiel ankaŭ la kvar sekvantaj, pri "Buddho", "Nirvano", "La universo" kaj "La doktrino resumita", estas tro nesufiĉaj kaj misgvidaj eĉ por resumiĝi.

²⁰Nur pri la morala fikciismo kelkaj vortoj devas esti diritaj: Bono estas ĉio, kio prosperigas, malbono ĉio, kio malprosperigas, la konscievoluadon, individue kiel ankaŭ kolektive. Inter la plej gravaj kaj plej ruinigaj eraroj estas la disvastigo de la emociaj iluzioj kaj mensaj fikcioj de la nescio, kies rezulto estas idiotiĝado.

3.5 Judge

¹William Quan Judge estis usona advokato de irlanda deveno, loĝanta en Nov-Jorko. Li partoprenis la fondon de Teozofia Societo. Ĝis sia morto en 1896 li per traktaĵoj kaj prelegoj provis diskonigi tiujn faktojn, kiujn li ricevis pere de Blavatsky kaj Sinnett. Lia plej elstara verko, *The Ocean of Theosophy* ("La oceano de la teozofio"), estas rigardata de tiu sekto, kiun li fondis, poste nomata la Tingley-anaro, kiel la plej elstara teozofia verko, la sola donanta ĝustan prezenton de la doktrino. Kiel nepravigita estas tiu aserto, devus esti evidente el la sekvaĵo. Jam delonge estas tempo, ke la faktaj eraroj ankoraŭ ripetataj estu klarigitaj por tiuj, kiuj ne havas aliron al pli malfrua literaturo.

²Kiel dirite, Judge estis lernanto de Blavatsky, kaj kiel ĉiuj aliaj, kiuj ĉiutage dum pluraj jaroj kaj en iaj ajn situacioj povis esti atestantoj de ŝiaj magiaj eksperimentoj, li kompreneble konvinkiĝis pri ties malfalseco kaj pri la kapablo de Blavatsky kiel eksperto pri la esoterika scio.

³Tre saĝe Judge rezervas sin mem, jam en la antaŭparolo de sia libro, por ke Teozofia Societo fariĝu respondeca por ĝia enhavo. La koncepto de la teozofioj pri tio, kio estas teozofio, kaj la origina, vera teozofio (la esoterika scio) estas, verdire, du aferoj plene malsamaj.

⁴Ne estas la intenco ĉi tie citi ĉion skribitan de Judge por montri, kiel neklara, konfuza kaj malpreciza estas la tuta komponaĵo, kiom da faktoj estas metitaj en malĝustajn kuntekstojn. Estas karakteriza lia entreprenemo anstataŭigi plurajn Sinnettajn faktojn per siaj propraj miskomprenoj. Ĉi tie la plej evidentaj eraregoj sufiĉu. Judge neniam sukcesis fariĝi kaŭzala mio.

⁵Lia diro, "La plej inteligenta vivaĵo en la universo, la homo", ne tre bone akordas kun liaj antaŭaj diroj, nek kun la postaj.

⁶Aŭ kion oni diru pri la jena? Pri la "plej grava sistemo", kiun instruis Blavatsky, li diras, ke ĝi estas konata de la Loĝio jam delonge, diro pri la planeda hierarkio, naturregno, eniro en kiun antaŭkondiĉas ĉioscion pri la homaj mondoj.

⁷Unu el la plej gravaj eraroj, kiu kunportis neripareblan idekonfuzon ĉe ĉiuj lernintoj de

Judge, estas lia intermikso kaj interkonfuzo de du mondoj plene diferencaj: la fizik-etera (49:2-4) kaj la emocia (48:2-7). La rezulto estas, kompreneble, unusola miksaĵo. Ambaŭ mondojn Judge metis sub la rubrikon de "astrala mondo". Per tiu nomo la antikvuloj difinis la fizikan etermon, ĉar en tiu mondo oni vidas trioble pli da steloj ol en la mondo videbla al la normala individuo. En la emocia mondo oni tute ne vidas stelojn.

⁸Alia termino, kiun Judge neniam komprenis, estas "astrala lumo". H.P.B., kiu ne sin ĝenadis pri terminologio, prenis tiun vorton el Éliphas Lévi, kiu lasis ĝin signifi ĉiujn specojn de materio kaj energio superfizika, iufoje eĉ "anima mundi" (la mondanimo). Tiun terminon do jam ne povas uzi tiuj, kiuj scias tion, pri kio ili parolas.

⁹La "sepoblan konstitucion de la homo" traktis Judge eĉ pli malbone, se eble, ol Sinnett. La homo havas nur kvinoblan konstitucion, nome entute kvin kovrilojn en fizika enkarniĝo. Sep kovrilojn havas tiuj individuoj, kiuj en la kvina naturregno fariĝis 45-mioj, akirinte, sekve, krom la homa kaŭzala kovrilo, esencialan (46) kaj superesencialan (45) kovrilojn. La homo ne bezonas tiuj du kovrilojn, ĉar li ankoraŭ ne akiris konscion eĉ en sia kaŭzala kovrilo.

¹⁰La "linga-ŝariron" de la hindoj Judge nomas la astrala korpo, per tio volante diri kaj la fizik-eteran kaj la emocian kovrilojn. La ĝusta termino, tamen, estas la etera kovrilo. La diro de Judge, ke "ĉi tiu termino venas proksimen al la fakto, ĉar la substanco de ĉi tiu formo devenas el kosma materio aŭ stela materio" estas nura sensencaĵo. Ĉio konsistas el materio, kaj ĉia materio estas de kosma origino.

¹¹Estas evidente, ke Judge ne komprenis, ke la etera kovrilo apartenas al la organismo, ke ĝi diseriĝas samtempe kiel la organismo kaj tio poĉele, tiel ke el la etera kovrilo super la tomo oni vidas la staton de dissolviĝo de la organismo. La aserto, ke post la morto la eteran kovrilon ekposedas la emocia kovrilo, do estas erara. Dum la homo dormas, la emocia kovrilo (kune kun pli altaj kovriloj) liberiĝas disde la organismo kaj la etera kovrilo. Se la etera kovrilo forpeliĝas el la organismo, okazas katalepsio aŭ ŝajna morto. En la proceso de la morto la emocia kovrilo liberiĝas disde la etera kovrilo, post kiam tiu forlasis la organismon.

¹²Tiel same konfuza estas la ekspliko de Judge pri la pli altaj kovriloj kaj konscioj de la homo.

¹³Li lasas la "animon" konsisti kaj el la "spirita animo" kaj el la "spirito", volante diri per "spirita animo" ion respondan al la 46-konscio, per la "spirito" la 45-konscion. En aliaj lokoj la "spirito" estas la "dia mio" aŭ la "radio el la Absoluta esto".

¹⁴Ne estas strange, ke konfuzo regas en la cerboj teozofaj.

¹⁵La kutima diro, ke la homo devas havi pli altajn kovrilojn por povi kontakti la diajn mondojn, evidentigas aŭ nescion aŭ senpripensecon. En la plej malalta kosma materio (la fizika atomo) ekzistas kosmaj atomoj de ĉiuj ceteraj specoj. La fizikan mondon penetras ĉiuj pli altaj mondoj. La planeda reganto posedas kovrilon el fizika atoma materio, kaj estas tiu monado en la 28-atomo de sia atomĉeno.

¹⁶Grava eraro estas la aserto, ke la planeda ĉeno ne konsistas el sep globoj apartaj inter si. La diro de Judge, ke la ĉeno signifas la pli altajn mondojn de nia planedo, estas malĝusta.

¹⁷Hantas ĉe li, kompreneble, la termino "iluzio" el la hinda iluziisma filozofio, termino kiu ĉiam paralizis la pensadon. Ekzemple li diras, ke "la 'ĉelo' estas iluzio ... Ĝi ne havas ekziston kiel materia objekto ... fizikaj molekuloj ... devas forlasi la ĉelon ĉiumomente. Sekve iu fizika ĉelo ne ekzistas." La fakto, ke okazas interŝanĝo de praatomoj en ĉiuj atomoj, ne signifas, ke tiuj lastaj ne ekzistas.

¹⁸La ĉapitroj pri la reenkariniĝado, karmo, kamaloko (la emocia mondo) kaj devaĉano (la mensa mondo), kaj pri la konscistadioj de la individuo inter enkarniĝoj, ne servas por doni klarecon.

¹⁹Judge havis precipan intereson pri la leĝo de periodeco, multe diskutante pri cikloj diversaspekaj. Pleje li ne iris plu ol priskribi la variajn nociojn pri tiaj ĉe diversaj popoloj.

²⁰Koncerne la demandon pri la ebleco antaŭdiri la estontecon, estas evidente, ke Judge

havis ĉi tiun problemon klare eksplikitan de Blavatsky. Ĉio, kio okazas, estas efikoj de kaŭzoj, kiuj povas troviĝi kiel ajn malproksime en la pasinteco. Por ke oni povu antaŭvidi la estontecon, oni necese sciu tiujn faktorojn, kiuj ankoraŭ ne aktiviĝis. La necerteco konsistas en la nescio pri tiuj faktoroj, kiuj povas aldoniĝi inter la antaŭdiro kaj la definitiva okazo. Plej ofte la estonteco aperas kiel multo da ebloj. Kiu el ĉiuj ĉi tiuj efektivigoj, estas necerte.

3.6 Hartmann

¹Franz Hartmann (1838–1912) estis germana kuracisto, kiu komence havis la ordinaran fizikisman kaj agnostikisman sintenon, kiu senĝene malakceptas ĉian diskutadon pri superfiziko kvazaŭ nura fantazio. En Usono, kien li translokis sian konsultejon, li havis okazojn studi la aŭtentikan magion ĉe lernintoj de H.P.B. Tio rezultigis, ke li ĉesigis sian praktikadon kaj veturis Hindion, al Adyar (apud Madras), kien H.P.B. jam lokis sian ĉeflokalon.

²Post kelkaj jaroj de esoterikaj studoj tie, dum kio li plurfoje havis okazon vidi la formojn kaj de M. kaj de K.H. dumtempe fizikigitajn, li decidis reveturi Germanion, en la jaro 1885. Tie li verkadis diligente, tradukante hindajn skribojn. Ekde 1893 li eldonadis la kvaronjaran revuon *Lotusblüten* kaj verkadis teozofiajn verkojn. Kiam en 1895 Teozofia Societo fendiĝis, li sin apartigis for de ambaŭ sektoj, profunde bedaŭrante la skismon, kaj fondis en 1897 en Germanio propran societon, "Internationale Theosophische Verbrüderung".

³Oni ne povas alskribi al li esoterikajn faktojn krom tiuj, kiujn li ĉerpis el la verkoj de H.P.B. kaj de Sinnett. La vivrigardo interesis lin pli ol la mondrigardo. Tro malmultaj faktoj estis haveblaj por ke li povu kontentigi filozofojn kaj sciencistojn. Tre baldaŭ li vidis la nefidindecon de la Steiner doktrino kun ĝia sciteoria bazo, kaj tial li firme apartigis sin de ĝiaj aliĝintoj, kiujn li ŝerce baptis "die versteinerten Theosophen".

⁴La ĉefa intereso de Hartmann estis direktita al la arto de la vivo. Tio ja estas la esenca por la mistikulo. Aliaj, pli mense inklinaj, deziras antaŭ ĉio scion pri la realo por ke, sciante la efektivan sencon de la ekzistado, ili povu decidi, kiel ili pensu, parolu kaj agi.

⁵Tio estas la origino de la malnova kontraŭeco inter la mistikulo (emociulo) kaj la esoterikisto (mensulo). La mistikulo opinias, ke la homa racio ne kapablas ekspliki la ekzistadon, kion ĝi ja ne povas. La esoterikisto scias tion, kaj vere li ne haltas ĉe la homraciaj ebloj konstati faktojn superfizikajn, sed serĉas tiun supran racion, kiu povas kontakti la Platonan ide-mondon. Ĝis tio estos atingita, li ne akceptos aliajn faktojn superfizikajn ol tiuj de la planeda hierarĥio. Pruvon, ke "faktoj" estas veraj faktoj, li ricevas per tio, ke ili prenas evidentan lokon en la hilozoika mensa sistemo Pitagorana, estas la plej simplaj, plej ĝeneralaj klarigoj de realaĵoj antaŭe neklarigeblaj.

⁶La mistikulo povas, verdire en maloftaj kazoj, atingi momentan kontakton kun la esencala (46) mondo kaj havi antaŭguston de ĝia beato, sed ne intelekti ion en tiu mondo, ĉar li malhavas la intuicion de kaŭzala konscio, kiu estas antaŭkondiĉo necesa.

⁷Hartmann per sia aktivado en Germanio ĉefe celis montri, ke la okcidentaj mistikuloj mezepokaj kaj novepokaj, Meister Eckhardt, Böhme, Silesius, Tauler, Gichtel, Saint Martin kaj aliaj, havis la saman sintenon al la vivo, kiel la hindaj mistikuloj.

⁸La nescio jam produktis tiom da nefidindaĵoj pri la mistiko, ke ne malutilos, se tiu demando estos eksplikita unu fojon por ĉiam.

⁹"Mistero" estis la deorigina nomo de "sekreta scio", kiun oni ne donu al aliaj ol apartaj inicitoj.

¹⁰Ne ekzistas aliaj "misteroj" ol problemoj nesolvitaj. Kiam la necesaj faktoj unu fojon estas ricevitaj, tiam la problemoj estas solvitaj kaj per tio ankaŭ la "mistero".

¹¹Tio, kion la mistikuloj nomas "misteroj", estas tiaj realaĵoj, por kies intelektado la individuo en sia evolunivelo malhavas la necesan sperton.

¹²"Mistero" do signifas, aŭ ke oni malhavas faktojn por klarigo, aŭ ke oni jam atingis la limon de individua kompreno (ĉio, kio estas super la propra komprenkapablo).

¹³Por la fizikismuloj, kiuj ne povas kompreni, ke ekzistas realo superfizika, ĉia superfizika estas mistero.

¹⁴La planeda hierarĥio volonte donas al ni ĉian scion. La plejmulto da ni ne havas la antaŭkondiĉon por ĝin percepti, kaj tial ni havas "misterojn".

3.7 La teozofia movado

¹Ĝenerale oni povas diri, ke la historio de la teozofia movado estas paĝo de prima, kiu entute pli malutilis ol utilis al la afero de la esoterika scio, kaj estis trea malkontentiĝo al la planeda hierarĥio. Anstataŭ frateco ekestis konflikto pri potenco kaj doktrino. Ili ankoraŭ ne vidis, ke tio detranĉis la ligilon kun la planeda hierarĥio.

²Eble la teozofoj opinias, ke oni devus diri "Teozofia Societo" kaj ne "la teozofia movado". Tamen estas ne unu sed pluraj societoj, el kiuj ĉiu pretendas, ke ĝi instruas la ununuran aŭtentikan scion pri la realo.

³Bedaŭrinde la teozofoj malkreditigis la esoterikan scion en la okuloj de la publiko ĝis tia grado, ke oni trovis dezirinde klarigi la kialon de tio.

⁴La opinio de la planeda hierarĥio, ke la demando estas tro frue levita, konfirmiĝis. Eĉ tiu parto de la homaro (ĉirkaŭ 15 procentoj), kiu atingis la stadiojn de kulturo kaj de humaneco, ne povis sin liberigi de siaj emociaj iluzioj aŭ de siaj mensaj fikcioj kaj, ne antaŭjuĝinte, ekzameni la vivipovon kaj realecan enhavon de tio, kion ili rigardis kiel misterigan idiologion.

⁵Blavatsky sturmis ĉiujn konceptojn regantajn en teologio, filozofo kaj scienco. Kaj ĉiuj tiurilataj aŭtoritaŭloj sentis ofendita la memgloron de ilia saĝo. Por pruvi, ke ŝi scias tion, pri kio ŝi parolis, ŝi okazigis sennombrajn magiajn fenomenojn. Sed ĉio, kion ŝi per tio atingis, estis nur, ke la reprezentantoj de la scienco deklaris, ke la afero devas esti trompaĵo, ĉar tia estas nebla, pro tio ke ĝi "kontraŭas al la leĝoj de la naturo".

⁶La scivolaĉaj, senprudentaj amasoj, tamen, alfluadis kaj aliĝadis al la societo. Tuj post kiam tiuj membroj ekaŭdis ion, ili kredis, ke ili scias kaj komprenas ĉion. Kaj tiel ekestis tiu araĉo da teozofoj, kiuj vekis nur ridemon pro sia babilado. Anstataŭe, ili devus ĉe sia aliĝo fari ĵurpromeson pri silentado.

⁷Provante evitigi miskomprenojn, la respondecaj personoj forte asertis, ke ĉiu vere havas la rajton de propra opinio, sed ne la rajton nomi ĝin teozofio. Tamen, kion utilis tio, kiam la plejmulto da la babilemuloj, por reliefigi siajn miskomprenojn, asertis, ke "tio estas teozofio"?

⁸La societo estis nominta du prezidantojn, kolonelon Henry Steel Olcott (1832–1907), kiu estu gvidanto de la organizaĵo mem kun ĝiaj praktikaj problemoj, kaj Blavatsky, kiu estu la spirita gvidantino. La taglibroj de Olcott, *Old Diary Leaves*, raportas en ses volumoj pri la societo kaj pri Blavatsky.

⁹Post la morto de Blavatsky decidis Olcott, kiu ĉiam estis la sola decidanto pri tiaj aferoj, ke Besant prenu la lokon de Blavatsky kiel spirita gvidantino. (Bedaŭrinde ŝi poste fariĝis diktatoro.) Tiu nomado, tamen, ne konvenis al Judge (unu el la fondintoj), kiu rigardis sin kiel la evidentan elektoton por tiu ofico. Kiel senfonda estis tiu altrudiĝemo, ĉiu komprenos, kiu komparas la kapablon de Judge kun tiu de Besant. Ekestis skismo, kiu en la jaro 1895 fendis la "universalan frataron" en amerikan societon, kiun estris Judge, kaj la ĉefan societon, kies sidejon Blavatsky jam lokis al Adyar apud Madras en Hindio.

¹⁰Judge ne havis grandan ĝojon el sia nova potencodona pozicio. Li forpasis en la jaro sekvanta (1896), kaj anstataŭis lin s-ino Katherine Tingley, kies koncepto pri frateco evidentiĝis per tio, ke ŝi utiligis ĉiun okazon por ridindigi la societon de Besant. Ŝi sufokadis ĉiujn provojn alporti al sia sekto novajn faktojn kaj ideojn, kaj tial ĝi plene nescias pri la grandaj progresoj, kiujn faris la scio pere de Besant kaj Leadbeater. La semo de dividiĝo unufoje semita rezultigis, ke ĉiam pli multaj anoj de ŝia sekto eliris, formonte novajn sektojn. Tiu mensa sistemo, kiun ŝi tre malfrue lasis formuli, estas rekte erariga.

¹¹Sed ankaŭ la Besanta societo havis malfacilaĵojn. Blavatsky provis fondi internan rondon,

esoteran sekcion, kiu ricevos tiajn faktojn, kiajn oni ankoraŭ ne publikigu. Post la morto de Blavatsky la sekcio fariĝis rondo, kie oni postulis ortodoksecon. Al ekstere oni povadis pompi per libereco de opinio. Sed la netoleremo iĝis evidenta per tio, ke “neinicitojn” la aliaj membroj ne rigardadis kiel “verajn teozofojn”, se ili ne aliĝis al la “esotera sekcio”. Tiuj novaj faktoj, kiujn la inicito ricevis, estis plene sensignifaj, kiel poste montriĝis. La aserto de la teozofoj, ke per aliĝo al la esotera sekcio oni ekrilatas kun la planeda hierarĥio, estas falsa.

¹²Entute oni povas diri, ke en la kondiĉoj regantaj hodiaŭ veraj esoterikistoj ne aliĝas al iaj societoj sed troviĝas ekster ĉiaspecaj organizaĵoj. Oni rekonas ilin per ilia komprenemo pri ĉio homa, kaj ili strebadas al vere homaj rilatoj inter ĉiuj, sendepende de raso, nacio, sekso, religio, politiko kaj ĉio alia, kio apartigas homon de homo.

3.8 Sektoj malorientantaj

¹Konfirmis, kompreneble, postea spertado la opinion de planeda hierarĥio de la jaro 1775, ke la proponita nova provo komuniki la scion rezultigos, ke la scion denove distordos nematuraj fantaziuloj.

²Ni nun havas, ja esceptinte la teozofiajn sektojn inter si disputantajn, grandan nombron de okultaj sektoj, multajn rozkrucajn sektojn kaj la Steineran antropozofion, kiu ankaŭ citas la rozkrucean ordenon kiel sian aŭtoritaton, tiun ordenon, pri kiu scias ion neniu.

³La scio pri la realo ne estas akirebla en la homaj mondoj, sed unufoje en la kaŭzala mondo, la mondo plej alta atingebla por la homo. La tiel nomata klarvido donas ne realan scion, ĉar al la homo mankas la antaŭkondiĉo por juĝi la realecan enhavon de tio, kion li spertas en la emocia kaj mensa mondoj. Tio estas evidenta ankaŭ tial, ĉar ĉiuj klarviduloj havas malsamajn opiniarojn.

⁴Nesciantojn konfuzas esoterikistojn kun mistikuloj (emociuloj). La antaŭaj havas mond-rigardon ellaboritan (kia ajn ĝi estas). La lastaj kontentiĝas per vivrigardo.

3.9 Finaj vortoj

¹Estas eksterkadra al ĉi tiu skizo la priskribo de tio, kion faris la sekretario de la planeda hierarĥio, D.K., dum la jaroj 1920–1950 por ebligi al la homaro akiri pli ĝustan koncepton pri la realo, pri la vivrigardo de pli altaj naturreĝoj kaj pri ilia komuna laborado por la konsci-aktiviĝado de ĉiuj. Tiom oni povas diri, ke la planeda hierarĥio utiligas siajn ekstremajn eblojn por malestigi plian mondmiliton, por helpi, pere de ĉiuj volontaj agantoj, al la homoj solvi siajn plej urĝajn problemojn: la problemojn de edukado, de monda ekonomio, de universala frateco kaj de la mondaj religioj. Ĝi petegas ĉiujn kaj ĉiun laboradi kune (ne ĉiu aparte) por la solvo de ĉi tiuj problemoj. Ĉiuj, kiuj volas kaj povas kontribui al tio, ricevas ĉian eblan ”inspiron”.

²D.K. atentigas, ke la individuo ne ricevis la scion por ĝui ĝin kun agrabla sento de super-eco. Ĝin akompanas respondeco, kiel ĉian scion.

La supra teksto estas la tria parto el tute sep de *La scio pri la realo*, libro verkita de Henry T. Laurency. Tradukis el la sveda Lars Adelskog en 1980. Kopirajto © Eldona fondaĵo Henry T. Laurency 1980 kaj 2017. Titolo de la sveda originalo: *Kunskapen om verkligheten*.

Postnotoj de la tradukinto

3.1.32 Cagliostro; elparolu: Kaljostro.

3.2.11 Leadbeater; elparolu: Ledbiter; Besant; elparolu: Besnt.

3.5 Judge; elparolu: Ĝaĝ.

3.6.1 Madras nomiĝas nune Chennai.

3.6.3 La germana esprimo ”die versteinerten Theosophen” estas ŝerca pro sia duobla senco, ĉar ĝi signifas kaj ”la Steinerigitaj teozofoj” kaj ”la ŝtonigitaj teozofoj”.

3.7.9 Vidu noton al 3.6.1!